

# Eŭropa Bulteno

---

Novembro 2017, Numero 175

---

## LABORPLANO DE EEU POR LA JARO 2018

Per la reta intertraktado inter la estraranoj en novembro 2017 baze de la estrara kunsido okazinta en Freiburg estis akceptita la orientiga Laborplano de EEU por la jaro 2018, kiun ni prezentas ĉi-sube. La membraro rajtas kontribui per rimarkoj kaj proponoj. Faru tion ĝis la fino de decembro konsiderante la realajn financajn kaj personarajn kapacitojn de EEU.

1. Ellaboro de 3-5 novaj projektoj baze de konkursoj de Eŭropa Komisiono kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Europano por civitanoj kaj Erasmus+.
2. Organizado de eŭropa konferenco pri la temo „Plano por kumana eŭropa edukado en lernejoj por eŭropa civitaneco“. Ĝi okazu dum la UK en Lisbono, en julio/aŭgusto.
3. Organizo de la kunsidoj de la Asembleo de EEU dum la UK en Lisbono dum kiuj oni prezentos raportojn kaj planojn kaj diskutos pri strategio de EEU.
4. Kunlaboro kun la membro de Eŭropa Komisiono V. Andriukaitis baze de diskuto en Freiburg. Aparte pri la plano kiun EEU proponis al la Eŭropa Komisiono organizi konferencon pri Edukado por eŭropa civitaneco en lernejoj kaj pri propedeŭtika funkcio de enkonduka lernobjekto Multlingva akcelilo.
5. Realigo de aprobota projekto kadre de Eŭropaj fondaĵoj, se iu el niaj proponoj estos akceptita, aŭ projekto en kiu EEU estas nur partnero.
6. Pluaktivi en Platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I.
7. Eldoni libron paperperforman pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 28 artikoloj pri la movadoj en 28 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2013 kaj kreis elektronikan formon de la libro troviĝanta en nia paĝaro.
8. Klopodo daŭrigi partoprenon de EEU en Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) komence de septembro 2018
9. Partopreno de EEU-reprezentantoj en laŭeble multaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.
10. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en ĉiuj konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU al kiuj ili estos invititaj.
11. Stimulado de landaj asocioj prezenti proponon en siaj landoj por akiri statuson de nacia kultura heredaĵo por esperantaj kulturaj atingiĝoj en la koncernaj landoj kiel tion atingis la poloj.
12. Plua klopodo serĉi vojon organizi kadre de Euroscola en Strasburgo apartan sesion por gimnazioj kun E-kursoj.

13. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj kaj lokaj societoj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro) kiel publikaj prelegoj, ekspozicioj, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj pri Esperanto kaj lingva problemoj...
14. Kompletigadi la retan kurson de E per komuna baza lernilo por komencantoj en ĉiuj lingvoj de EU baze de la eltrovita fundamenta morfemlisto de la plej oftaj morfemoj en parole kaj skribe uzata Esperanto (esploroj de Z. Tišljar kaj R. Gerard) en la retejo [www.learn.esperanto.com](http://www.learn.esperanto.com).  
Ĝin kreis germana esperantisto Georg Jaehnig kaj ĝis nun estas finfaritaj kursoj en 22 lingvoj, inter kiuj plimulto estas eŭropaj lingvoj.
15. Disvastigo de konkludoj de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por Antaŭenigo de Multlingveco, per prelegoj kaj rondaj tabloj.
16. EEU-kunlaboro kun diversaj mondaj kaj eŭropaj organizaĵoj kiel UEA, TEJO, SAT, EDE, ILEI, AEK, AVE...
17. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro kaj paĝaro de Remush (<http://remush.be/bulteno/index.html>).
18. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU: [www.europo.eu](http://www.europo.eu)
19. Helpi realigon de la eŭrop-financata projekto Multlingva akcelilo
20. Ekprepari la 11-an kongreson de EEU en la jaro 2019
21. Organizati 2 estrarkunsidojn kaj konstantan elektrtronikan kumunikadon inter la estraranoj.

Prezidanto de EEU: Seán Ó Riain

Sekretario: Zlatko Tišljar

## ESPERANTO ĈE LA EUropa TAGO DE LINGVOJ EN VIENO



Pli ol 300 homoj ĉeestis la Vianan feston de la Eŭropa Tago de Lingvoj, organizita de la Eŭropa Komisiono en Eŭropa Unio-Domo, la 23-an de septembro. Esperanto rolis inter la legataj lingvoj, kaj la homoj aparte multe aplaŭdis kiam oni prezentis ĝin. Antaŭ ol legi en la irlanda, mi trovis okazon diri ke „mi tre ĝojas ke la samrajtiga lingvo, Esperanto („Die Sprache der Gleichberechtigung“) ĉeestas nian lingvan feston“.


Konferenco pri eŭropa multlingvismo fare de profesorino Eva Vetter el Viena Universitato komencis la vesperon. La ĉefa evento konsistis el 1-minuta legadoj de la populara infanlibro, "Pipi Ŝtrumpolonga" en 35 lingvoj. Krom la oficialaj EU-lingvoj, oni legis en la rusa, turka, japana, georgia, hebrea, Esperanto, kimra, kataluna, luksemburgia, albana, svisgermana kaj eĉ la viena kaj vorarlberga dialektoj de la germana. Ne nur la kroata estis legata, sed ankaŭ la burgenlanda kroata. Ĉar la libro ne estis tradukita al la irlanda, mi faris mian propran tradukon (kuna) kaj legis ĝin ĉe la festo. La prezidanto, Achim Braun de la Eŭropa Komisiono, prezentis ĉiujn lingvojn. Fakte, kiel li klarigis, la irlanda ĉeestis nur dank al Esperanto! S-ro Bernard Tuidar, direktoro de la Muzeo

pri Planlingvoj, Vieno, jam legis en Esperanto en 2016. Li rimarkis ke ne estis legado en la irlanda, kontaktis min, kaj mi kompreneble akceptis.

La kimran legadon faris S-ino Nerys Jones, brita diplomato, kaj mi poste parolis kun ŝi en la kimra lingvo. Bernard Tuider kaj mi multe babilis en Esperanto, kaj pluraj homoj diris al mi poste ke estis la unuan fojon kiam ili aŭdis Esperanton.

Seán Ó Riain

## FILMO PRI ESPERANTO



La itala artistino Giulia Bruno loĝanta en Berlino kreis unuan duonhoran filmon el impresoj, kiujn ŝi kolektis en la tuta mondo. La filmo estas daŭre montrata en la berlina kulturejo Zonoteka, en prezento de tri filmoj, kiuj ĉiuj rilatas al demokratio.

Videblas en la filmo pri Esperanto docento el Jamajko, kiu prezentas la teknikan evoluon per la ekzemploj de skribado kaj presado kaj ilian influon al la kreiĝo de naciaj ŝtatoj - interesa estas la paralelo al Esperanto, kiu formis internacian lingvokomunumon. Humphrey Tonkin prezentas siajn ideojn pri lingvopolitiko kaj pri Esperanto-argumentoj. La filmo montras Esperanto-lecionon en Indonezio kaj la rilaton de la principoj de la Bandung-ŝtatoj al la ideoj de Esperanto. Giuseppe Grattapaglia rakontas la historion de la uzado de Esperanto fare de la itala aŭtomobil-entrepreno Fiat en la sesdekaj jaroj.


Belas vidi konstru-desegnaĵojn de aŭtoj en Esperanto kaj varbofilmojn por ili. Videblas ankaŭ impresoj el la ĵusa Universala Kongreso en Seulo, kun honoraj gastaj multfoje fotataj kaj dancprezento, kiun akompanas orkestro.

La artistino dum la pasintaj jaroj kolektis ankaŭ aliajn filmajn pecojn, ekzemple en la Zamenhofa Omaĝo aprile en Berlino. Ŝi planas krei novan pli longan filmon pri Esperanto.

Lu Wunsch-Rolshoven

## SCRATCH– PROGRAMISTA PLATFORMO (NE NUR) POR INFANOJ

Ĉu programado povas esti amuza kaj alloga eĉ por infanoj? Fakte jes! Krome, eblas lerni ĝin eĉ en Esperanto!



Pluraj talentitaj homoj de la fama Masaĉuseca Instituto de Teknologio (MIT) demandis sin: “Kiel per amuza kaj luda formo instrui al infanoj (kaj ne nepre nur al ili, samo funkcios al plenkreskuloj) programadon?” Sekve ekestis la projekto “Scratch”, kiu volas plenumi ĝustecon – ludeme instrui al homoj bazojn de programado, faciligi la procezon kaj vekti kreemon ĉe la uzantoj. La reta platformo nuntempe funkcias jam en pli ol 80 lingvoj, inkluzive Esperanton! (En ĝi ne estas tradukita ĉio – ĉar temas pri tre multaj tekstoj, sed ekzistas la bazo por uzi la retejon plene en Esperanto).

La retejon do eblas elkore rekomendi al ĉiuj, kiuj emas lerni programi, ĉefe al infanoj, sed ankaŭ al kreemaj homoj, kiuj ne nepre volas lerni programadon, sed pere de ĉi-retejo (sistemo) emas utiligi sian kreeman potencialon – en la programo eblas krei vere diversajn kaj diversspecajn aferojn – poŝtkartojn, komputilajn ludojn, videetojn, animaĵojn, kvizojn, kursojn ktp. (Troveblas jam pluraj Esperanto-kursoj en la retejo.) La uzeblo varias ĉefe laŭ viaj kapabloj kaj bezonoj.



Certe indus ankaŭ helpi fintraduki la retejon al Esperanto, temas pri ege utila projekto por nia movado. La retejo de Scratch estas: <https://scratch.mit.edu>; elekti/ŝanĝi lingvon oni povas sube en la retejo.

Ankaŭ tiun ĉi retejon prezentis E@I la 20an de oktobro al lernantoj en Partizánske (sidejo de E@I en Slovakio) okaze de la tuteŭropa aktivado “Meet and Code” (Ni renkontiĝu por programi), kiu okazas dum la “Eŭropa semajno de programado”. Ĉi tiu iniciato celas pretigi infanojn kaj gejunulojn por la bezonoj de cifereca mondo de la estonteco, subtenante ĉiajn formojn de programado.

E@I pretigis du programerojn. La slovaka esperantisto kaj profesia programisto Viliam Búr prezentis al lernantoj kaj studentoj en Partizánske sian profesion. Unue en gimnazio li parolis pri la nuna stato en la programista profesio, pri la programlingvoj, pri laboro, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de tiu ĉi nuntempe ege bezonata profesio. Poste li kune kun Peter Baláž

prezentis "Scratch"-on al infanoj de bazlernejo en la urbo. Dum du horoj ili vere kaptiĝis kaj kapablis fari bazajn komputilajn ludojn. Temas pri ege potenca ilo, certe uzinda ankaŭ en la Esperanto-movado!

Peter Baláž (El La Ondo de Esperanto)

## LA KATALUNIA REFERENDUMO KAJ KIO ESTIS MALANTAŬ ĜI

Katalunaj naciistoj argumentas (prave) ke la kataluna lingvo multe pli proksimas al la latina kaj enhavas pli da grekdevenaj vortoj ol la kastilia lingvo, kiu ensorbis kaj eŭskajn kaj arabajn elementojn. La plej politike malkorekta rimarko kiun alilandano povas fari pri la kataluna estas ke ĝi estas "dialekto" de la "hispana". Fakte, la portugala – lingvo de nacio sendependa de post pli ol okcent jaroj – estas pli proksima al la kastilia-hispana ol la kataluna.

Je la oka jarcento, la plimulto de la iberia duoninsulo estis regita de la invadintoj. La lingvoj de la okcidenta duono de la duoninsulo en Galegio kaj Leono similis al la portugala kaj enhavis certajn keltan kaj ĝermanan influojn, dum tiuj en Aragono, Katalunio kaj la Balearaj Insuloj pli apudis al Romo. Sonoj kutimaj en la lingvoj araba, eŭska kaj kastilia hispana kiel la dura gutura "j", "ch" kaj "ñ" (h, ĉ kaj nj) forestas el la kataluna. Tra tuta Hispanio, stratŝildoj estas surpentritaj kun grafitioj en la kataluna kaj eŭskaj regionoj per la lokaj lingvaj ekvivalentoj (vd. Postskripto sube).

Castilian	Catalan	Esperanto	Latin	English
Ventana	finestra	fenestra	fenestra	window
Cerdo	porc	porko	porcus	pig
Hijo	fill	filo	filius	son
Azul	blau	blua	caerulus	blue
Llave	clave	klavo	clavis	key
Ojo	ull	okulo	oculis	eye
Noche	nit	nokto	nox	night
Primo	cosi	kuzo	sobrinus	cousin
Caballo	cavall	ĉevalo	equus	horse
Abuelo	avi	avo	avus	grandfather

La internacia planlingvo, Esperanto, similas la katalunan pli ol ajnan alian nacian lingvon, kaj tiun similecon katalunaj naciistoj uzis kiel ŝildo dum la frua periodo de la regado de Ĝeneralo Franco (proksimume 1940-1970) kiam la kataluna lingvo estis subpremata, malaprezata kaj fakte

ekskludita el ajna publika manifestacio aŭ kultura ekspozicio.

La lingva demando estis dumlonge kaj daŭre estas fonto de iritiĝo por katalunoj kiuj devas memori la mondon ke ilia lingvo havas pli da parolantoj, preskaŭ naŭ milionojn, tra Hispanio (kiel kaj unua kaj dua lingvo) ol la dana lingvo (apenaŭ ses milionojn), kaj tamen ne havas ajnan rekonon flanke de la Eŭropuniaj institucioj aŭ ekster Katalunio. Komparu tion kun la oficiala statuso por la irlanda kun ne pli ol 20.000 parolantoj.

La kataluna ricevis la saman statusan kiel la skotgaela (50.000 parolantoj) kiel "duonoficiala" lingvo de EU. Tra la pasintaj kelkaj jardekoj, la loka aŭtoritato (Generalitat) de Katalunio

sukcesis igi la katalunan lingvo de instruado en ĉiuj ŝtataj bazlernejoj kaj mezlernejoj, simile kiel faris la kebekianoj pri la franca lingvo en Kebekio. Paralele, multaj reglamentoj kiuj unuavide garantias dulingvecon en la kastilia hispana kaj la kataluna ofte interpretiĝas favore al la kataluna.

Tradukis Sandra Schweder

(fonto: [http://www.newenglishreview.org/custpage.cfm?frm=189055&sec\\_id=189055](http://www.newenglishreview.org/custpage.cfm?frm=189055&sec_id=189055))

## ESPERANTO-EVENTO EN RUMANIO



Rumana Akademio-Filio Kluĵo-Napoka/Koloĵvaro, Instituto por Historio”George Baritiu”, la Departamento de la Socio-Humanaj Esploroj, organizis jaran sciencajn sesion de la 17a – ĝis la 18a de novembro 2017. Inter aliaj, estis prezentitaj ankaŭ tri sciencaj eseoj rilate al lingvo Esperanto. Ĉi tiuj apartenas al verkistino Luiza Carol (Israelo): “Aspektoj pri la psikologia rilato inter leganto kaj verkisto kadre de la originala esperanta beletra literaturo”; Ionel Onet (Nederlando): Diskonigi naciajn

kulturojn helpe de la internacia lingvo Esperanto. ( Bibliografio de tradukaĵoj el la rumana literaturo en Esperanton. Rotterdam: Eldonejo Bero, 2007); kaj Marian Vochin (Bukureŝto-Rumanio): “Internacia lingvo Esperanto kaj ĝia disvastigo en Rumanio”.

La eseoj prezentitaj estis interesaj por partoprenantoj, precipe ke pasintjare, dum la scienca jara sesio, estis prezentita eseo de Luiza Carol: “Esperanto, kiel lingvistika fenomeno, psiko-sociala kaj kultura”. Tiu eseo aperis en volumo 30 de la “ Studoj kaj Esploroj el fako de la socio-humanaj sciencoj”(Studii si Cercetari din domeniul stiintelor socio-umane), Editurile Limes & Argonaŭt, Cluj-Napoca, 2017, ISBN 978-606-799-146-8; ISBN 978-973-109-730-5, paĝoj 113-124. Menciinde ke Rumana Akademio estas la plej grava scienca aŭtoritato en Rumanio kaj estas la unua fojo ke okazis tia prezentado de tri eseoj pri Esperanto dum la scienca sesio de la Akademio.

Marian Vochin

## SCIENCA SIMPOZIO EN BELGIO

Internaciigo de universitatoj atingis novan fazon. La angla ŝajnas fariĝi la sola lingvo de akademianoj. Sed ĉu tiu evoluo estas ĝusta kaj pozitiva por la edukado kaj esplorado? Kio pri la stato de naciaj lingvoj en la universitatoj? Kvindek jarojn post kiam la Universitato de Loveno (Lueven) enkondukis la nederlandan kiel oficialan lingvon, nova debato pri la pozicio de la angla en la akademia vivo estas necesa. Pro tio la Universitato de Loveno organizas simpozion pri tiu temo kiel omaĝon al 50 jaroj de la nederlandlingva universitato en Loveno.

## INTERNACIA SIMPOZIO

»Internaciigo de universitatoj kaj la nacia lingvo«

Loko: Universitata halo, Naamsestraat 22, Leuven, Belgio

Dato: la 4-an de majo 2018

Pli pri tio ĉi tie: <https://mail.google.com/mail/u/0/#label/Europa+Bulteno/1600851105ddf1de>

Jozef Reinart

## RAPORTO PRI LA 30-A DATREVENO DE LA RATKAPTISTA BANDO EN HAMELEONO (GERMANIO)


Estante rakontistino de fabeloj, imagu inviton al la Urbo mem el unu de viaj plej ŝatataj rakontoj. Ĉu vi povus rezigni iri tien? Mi ne. Kaj vi eĉ pli komprenus se vi scias ke tie la invitantoj parolas mian plej ŝatatan “fremdan” lingvon, Esperanto. Komprenoble ankaŭ pluraj el mia dua familio, mia Esperanta amikaro, aŭ loĝas tie aŭ ankaŭ venas.



Ĉu al ilia rendevuo nur venas rakontistoj? Hahahaha! Tute ne! El diversaj landoj kaj landpartoj venas aliaj Esperantistoj al la ĉarma urbo, al la amikaro tie, ne nur por interkonatiĝi kun la rakonta flanko, tamen por kunesti en amika rondo, havi seriozajn kaj iom malpli seriozajn, eĉ verajn amuzajn agadojn kune.

Do ekde kiam aperis la invito en mia retskatolo, anoncante ke venos eĉ miaj karaj amikoj muzikistoj el Frislando kiujn mi revidos post mi ne scias kiom da jaroj? Kaj venos mia “EO-

nepo” la energiplena, kortuŝa afabla juna Johny M. Mi tuj ĝojis, kaj ekis interkonsenti pri tranoktado kaj por trovi kunvojaĝantojn tien. Kial? Ĉar ja estas tamen granda distanco por sole veturi ĉu, kaj malpli kosta por la aero kaj por la monujo se pluraj uzas la saman veturilon, ĉu?



Ĉar mi disponis nur pri 1 ½ tagoj, ni diru semajnfino, ne estis tiom facile trovi iun? Amikoj kiuj normale vere kunĝojus la etoson havis aliajn devojn hejme. Imagu mian ĝojon kiam mia bofratino, vera komencanto, anoncis ke ŝi volus ankaŭ partopreni. Loĝi ni povis ĉe miaj karaj amikoj Klaus kaj Waltraut, ambaŭ el la “Ratkaptista bando”de

Hameleno, loĝante iom pli for en Benten. Kompreneble estis ĝojiga respondo, ĉar mi ŝategas tiujn gastigemajn amikojn! Mi konas la loĝan parton de la domo, kiu vere por ni estas luksa! Mi tuj denove scivolemis pri la plantaro en la grandega verando. Ĝi enhavas multajn plantojn, kiujn mi ne konas. Aparte mi scivolemis pri la grandega Geranio. Mi neniam antaŭe vidis tiom grandan.

La festaj tagoj jam komenciĝos je la 10<sup>a</sup> sabate matene. Mia bofratino devis labori ĝis almenaŭ la 4<sup>a</sup> kaj ½, kaj mi kalkulis ke ni veturos 4 ĝis 5 horojn. Fi! Eki jam je la 5<sup>a</sup> matene, ĉu mi estu tiel kruela por mia nov-komencanta bo-fratino estante mem noktobirdo? Do mi kuraĝis retumante demandi ĉu eblus alveni jam vendredon. Kaj vere mi ĝuis la respondon “jes kompreneble venu jam vendredon, ne gravas ke estos malfrue, ili ankaŭ estas noktobirdoj!” Daŭris ankoraŭ iom da semajnoj antaŭ ol vere okazos tiu plezura semajnfino, kaj mi aŭdis foje ie kaj tie ke tiu kaj tiu ankaŭ venos. Plialtiĝis mia antaŭĝojno tage post tage.

Kaj do la 25an “ek al la voj”. Ni ne kunhavis mapon, ni ja estis modernaj vojaĝantoj. Ni do saĝe sekvis la vojindikilon, ĝis... Ne eblis atingi Hamelenon pere de normala vojo! Imagu je la malhela 9a kaj iom nokte, grandaj ruĝaj lumoj sur barilo baris la vojon. Neniu indikilo kien do iri... tri fojojn ni rondronde esploris la stratojn. Unu fojon finiĝis la vojo eĉ meze en kamparo. Bone, siamaniere ni tamen atingis la domon kaj estis akceptitaj kiel koraj amikoj de koraj amikoj. Ĉu ekzistas iu alia fonto, el kiu oni povas ricevi tiom da amikeco, ol Esperanto? Post kelkaj minutoj ni jam sidis antaŭ varme memfarita bongusta supo ĉe tablo plenmetita de multaj manĝeblaj aĵoj, nekredeble! La filo kaj la plej aĝa nepo ankaŭ ĉeestis. Pli da homoj por komuniki! Ili tamen bedaŭrinde ne parolas esperante. Ni sentis kaj konstatis ke ni estis ege bonvenaj! Ni babilis kiel nur veraj amikoj sentime interrilatas. Kaj preskaŭ tro malfrue ni enlitoĝis tute kontente, antaŭĝuante la venontan tagon.



Bone, la vekhorloĝo klare ne funkciis, mi aŭdis en la kuirejo jam Waltraut, kiu preparis matenmanĝon. Mi jam de antaŭaj fojoj sciis ke vere denove estos tre abunda. Kaj ni urĝe preparis nin por ĝustatempe esti je la tablo, kaj for al la renkontiĝo.

Kaj finfine en le Sumflume, konataj ridantaj vizaĝoj, kaj dorsoj. Granda knufila rondo komenciĝis. Amikoj en al mondo, vi konas la senton knufli alian amikon ĉu? Mojosa! Mi

sentis min ŝvebante de unu al alia ĝuante tiom da plenkoraj amikeco.

Salono plenplena de esperantistoj, konataj, ne jam konataj, de ĉiuj aĝoj, aŭskultis la bonvenigan paroladon kaj historiajn datumojn kiujn Heinz W. Sprick tute ĉarme, kia li estas, flue ŝprucis tra la salonon.”.

Tiam, kiam la ĝenerala kunsido de la membroj ekis, ekis samtempe la unua grupo por gvidita rondiro en la ĉarma, surprize bone prizorgita, historia urbo Hameleno. Nia loka gvidistino nur parolis germane, kaj imagu, kvankan mi proponis traduki por tiuj kiuj ne komprenis, ne bezonatis! Esperantistoj do vere kapablas pli da lingvoj!

Post dufoja vizito al tiu ĉi urbo en plena suno, nun la ĉielo pro kaŭzo kiun mi ne tute komprenis iom ploretis. Ne sufiĉe por forigi la homojn de la strato, nur por ke kelkaj tamen surmetis ĉapon, aŭ ŝirmis sin pere de pluvombrelo. Ne gravis ĉar la etosoj estis gaja!



Estis amuze konstati la silentan aŭskultadon de la gvidistino, kaj poste promenatne al sekvonta vidindaĵo inter ni, Esperanto regis la paroladon. Tiom interesa estis la promeno, kaj ni finfine devis hasti tra malgrandaj stratetoj por alveni ĝustatempe por la tagmanĝo.

Lokajn bongustaĵojn oni rajtis mem preni el la potoj, kelkajn abunde, aliajn iom pli ŝpare, ĉar estis surprize multe homoj. Nu ja, ĉiuj scias ke vi povas organizi ĉion ĝis malgrandetaj detaloj, kiel eĉ sur la nomŝildo aperis kion oni mendis antaŭe, kaj pagis por ĝi. Se oni tro fidas, ne kontrolante, povus esti ke la lastaj..... tamen laŭ mi neniu mortis pro malsato. Poste Heinz al la tablo ankoraŭ portis pli da deserto, forprenite de homoj kiuj ne plu sciis ke ili ne mendis ĝin. Estis amuze ĉar ĉiuj trovis lokon por trankvile mangi en amika rondo.



Posttagmeze prezentadoj, kaj prelegoj kiujn ni ĉeestis kiam alia grupo partoprenis la duan gviditan promenon en Hameleno sub pli kontentiga seka ĉielo. Helmut Klunder prezentis al ni la nordfrizajn insulojn. Ne, mi ne povus vivi tie! Daŭre la insuloj estas reformataj, foje tuta vilaĝo falis en la maron, imagu se vi havus domon tie? Kaj jes, dum somero estis laboro, se vi havis ion ajn farante en turismo. Eĉ iri al kontinento ne estis tiel facile pro la tajdoj, kurento de la maro, kaj la tro malmulte da homoj kiuj

uzas la pramŝipon! Ĝi nur 2 foje tage funkcias! Kaj eĉ ne ĉiam samhore iri labori sur la kontinento nur povas tiuj kiuj ankaŭ tranoktas tie, kaj ili tute ne povus havi regulan labortempon.. imagu! Sed, la loĝantoj trovis konsolon en diversspecaj bongustaj alkoholaĵoj! Kompreneble kiu konas Helmut, kiu ne estas havardo, kaj plenkore lasis Gunteron disdoni diverajn bongustajn likvaĵojn, inkluzive de unu sen alkoholo. Imagu, el la sablo tamen kreskas beroj! Kompreneble ke oni ankaŭ tuj esploras kiel uzi ilin, ĉu? Ili estas tro amaraj por mangi ilin, tamen por fari trinkaĵojn ili taŭgas, mjam! Post lasta gustumado, varma grogo, kiun ankaŭ al la aliĝantoj al la sekvonta prelego oni prezentis, venis Heinz W. Sprick mem kaj rakontis al ni pri „Vojaĝo tra Israelo kaj Jordanio“. Kiaj belegaj bildoj, kia belega naturo, kvankam ne multe kreskis sur tiuj ruĝaj montoj. Kia aventuro! Ĉiuj konas Heinz suface bone por scii ke li surprizas ĉiam, pro sia aŭdaco, originaleco, kaj ĉarma flua parolo.

Intertempe ie en la urbo okazis renkontiĝo antaŭ la Münster-preĝejo (dorsa flanko) kun klarigoj pri la nova Eskap-Ĉambro en la kelo de la Münster-preĝejo. Kiu kuraĝis, lasis transmeti sin reen en la tempon de la jaro 1284 kaj sukcesis solvi ĉiujn enigmojn en la malnova alĥemiista kelo ene de unu horo? Nur helpis bona grupa agado. Pri tio mi nenion scias, ĉar mi ne partoprenis. Ankaŭ pri la en la Germana laŭtleĝado de la krimromano de D-ro Thorsten Sueße “schöne frau, tote frau” mi nur malmulte scias, ĉar neniu preparolis tion antaŭe kun mi. Devis tamen esti, ambaŭ interesaj aferoj. Unu post la alia : muzikistoj/kantistoj alvenis, kio rezultis en abundaj knufladoj kaj demandoj pri la vivo unu pri la alian ktp. Kiel aliel bonvenigi karajn amikojn? Ili preskaŭ tuj provludis kaj poste planis vespermanĝi. Tiam Waltraut iris kun ni hejmen, kie ni denove renkotiĝis kun la filo kaj la nepoj. Jes nun ankaŭ la plej malgranda sidis je la tablo, iom tima, tamen ne por longe. Mia urseto, jam anoncita de avinjo Waltraut, forvaporigis la infanan timon kaj post nelonge ni ĉiuj plene ĝuis la vespermanĝon.



Kompreneble por urba vizito aŭ por muzikplena vespera dancado, oni aliel vestu, ĉu? Do ni alivestis kaj reen al Sumflume por la aloga vesperprogramo. Mi certe ne devas priskribi la agadon kun Kajto-kantistoj, ne eblas ke iu ne jam konas ilin. Do estis du partoj de kantado kaj de kunkantado. Kaj finfine estis ankaŭ kundancado. Bone, unue ekserĉi kiel fari tiun dancadon kiu datis de longe longe for! Tiuj kiuj restis surseĝe malpravus! Estis mojosa momento de granda interamika Esperanta internacieco. Kaj tuj poste sen granda paŭzo, saltis sur la scenejon Johny M, kiun mi konsideras kiel EO-nepo de mi. Ĉu surpriziĝis iuj ke la dancspaco ne plu malpleniĝis? Rega hiphop kantado de energieplena junulo kiu regas la scenejon kiel sian propran vivĉambro, entusiasmigas ĉiujn! La drathara frizaĵo daŭre kundancis! Ankaŭ la membroj de Kajto plezure kundancis. Tiu vespero vere amuzis ĉiujn! Iom pli malfrue ol pripensite finfine ĉiuj iris al litoj, mi pensas. Vere certi mi ne povas. Ludemaj homoj ĉiam troveblas en EO-renkontiĝoj. Tamen ni iris hejmen kun Waltraut. Klaus jam delonge dormis, mi pensis, tamen ne! La viroj atendis nin tute kavalire. Lastan knufan rondon kaj ek en la lito!



Dimanĉon matene denove nekredible plena tablo bonvenigis nin al matenmanĝo. Ni tiom longe ĝuis ĝin ke ni maltrafis la komencon de la prelego de Bernard Larue, pri la rondirado tra Usono. Mi tamen kelkan movantaj bildoj de bizono en okulpunkto vidis, rapide enrigardante la salonon. Tamen, estis en aliaj salonoj pulbazaro. kredu min. Nerezisteble por personoj kiel mi kaj post la prelego mi denove aperis kune kun bofratino kaj iom da sakoj da varoj.

Intertempe dua grupo estis for por solvi la enigmojn en la ĉambro kaj kelo de la Münster preĝejo. Ankaŭ de ili mi ne aŭdis iun ajn klarigon. La Kurseto de Frank Lappe pri unua helpo/sukurado estis vigla agado, ŝajne kelkaj ne estis kompletaj laikoj. Frank kunhavis multege da materialoj kaj ekserĉigis partoprenantojn por sekcii pupon, post kio li faris la sian

helpe de viktimo Heinz W. Sprick, ridiga afero. Humoro neniam manku en prelegoj, kaj instruadoj, dankon ankaŭ al vi Frank!

Fine de la renkontiĝo ni festis dum komuna tagmanĝo en la najbara ĉina restoracio „Shangri La“ kaj vere la manĝelekto estis abunda, varie, bongusta, aloga, kaj surprize malaltpreza! Iu post la alia denove malaperis, kelkaj nur post varmaj amikaj knufloj, kelkaj iom pli longe restis. Ni reordigis la salonon, pakis la libroservon, kiu estis ege bonvena. Reknufliis lastfoje kaj kun Waltraut denove “rehejmis”. Ni jam pakis matene do havis iom da tempo ankoraŭ por kafumi kaj regaliĝi pri membakita kuko de mia bofratino, kaj pri malvarma hundo. Ĉu vi ne konas “malvarman hundon”? Tiam nepre ĉeestu iun renkontiĝon kie aperas Gunter. Jes mi konfesas ke ni estis lacaj, ambaŭ mia bofratino kaj mi kiam ni reiris denove al la ĉiutaeca hejmo, tamen babilante pri ĉiuj belegaj momentoj de tiu ĉi semajnfino inter amikoj, ni en nur 3 horoj denove estis je nia propra lito. Ŝi, kompatinta ino, tuj devis jam frue labori lundon, mi dorlotita ino, rajtis iom pli longe dormi, kaj sonĝi pri Hameleno, el kiu Waltraut kaj Klaus, iam vizitos nin ĉe nia hejmo. Heinz W. Sprick metis jam la daton de la Beneluksa kongreso en sia agendo, kaj do venos.

Neniam renkontiĝoj vere ĉesas, unu alogas al la sekvanta, kaj ĉie amikaro atendas unu la alian por travivi belegajn momentojn kune. Do ni neniam vere adiaŭas, iam ni certe revidos nin! Kun granda dankemo al ĉiuj miaj EO-amikoj. Listo tro longa por aldoni. Kaj kial mi faru? Ĝi kuŝas tute sekure ĉe la organizantoj. Se vi volas enrigardi ĝin, demandu ilin!

N Nicky Janssen

## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de novembro 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, N Nicky Janssen, Seán Ó Riain,

Jozef Reinwart, Sandra Schweder, Lu Wunsch-Rolshoven, Marian Vochin, Peter Baláž

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

